

The North American

ESPERANTO REVIEW

III: 5-6

IN THIS ISSUE:

How Artificial Is Esperanto?

R. C. Marble:

"X" Verbs in Esperanto

D. B. Richardson:

La Gardostaranto

MAY - JUNE, 1955

III: 5-6

R

For That Bored, Listless Feeling

La Knaboj de Paŭlo-Strato30
La Princo kaj Betty35
La Alia Pasinteco	3.00
Gosta Berling35
Kiso de la Reĝino75
Kredu min, Sinjorino	1.65
Murdo en la Orienta Ekspreso35
La Nekonata Konato <i>paper, \$1.00; bound</i>	1.25
Princino de Marso35
Ringo de Generalo75
La nova Testamento	\$.25 and .50

Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.



Play Ball! Get into the big League Esperanto League for North America, Inc.

Regular Member, \$3; Man and Wife (regular members, but receive only one copy of publications, etc.) \$4; Supporting Member, \$5; Patron, \$10; Life Member, \$50.

Send application and payment to the Treasurer: Edw. W. Pharo, Jr. County Line Road and Simms, Somerton 16, Pennsylvania.

Make checks and money orders payable to: Esperanto League for North America, Inc.



The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Third Year

May-June, 1955

No. 5-6

CONTENTS

How ARTIFICIAL is Esperanto?-----	2
Esperanto Around the World-----	5
Esperanto in North America-----	6
La Gardostaranto-----	8
Du Maristaj Kantoj-----	11
Novaj Libroj-----	12
Bolonjo Vokas-----	13
"X" Verbs in Esperanto-----	14
Announcements-----	16

The North American Esperanto Review

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

Addresses: Subscriptions and bulk orders should be sent, with payment, to the Treasurer. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the League Secretary. Send literary contributions, news items, announcements, etc. to the Editor: David B. Richardson, 3412 No. Mullen, Tacoma 7, Wash.

Deadlines: The *Review* is placed in the mails about the fifteenth of every second month. Material for publication must be in the hands of the editor no later than

the 15th of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *President:* John L. Lewine, 52 Riverside Drive, New York 24, N. Y.; *Vice-President:* James D. Sayers, RFD 2, Lillie, La.; *Secretary:* Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer:* Edward W. Pharo, Jr., County Line Rd. and Simms, Somerton 16, Pa.; *Chairman, Executive Board:* F. R. Carlson, 2116 N. 35th St., Seattle 3, Wash.

Membership Dues: Regular Member, \$3; Supporting Member, \$5; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member but receiving only one copy of publications, etc., \$4.

Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.

Make checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."

How ARTIFICIAL is Esperanto?

From time to time one hears arguments opposing the idea of an international language on the premise that such a language must be "artificial" and that "artificial" languages, lacking natural development and with no attachment to any cultural group, are not languages at all, and can only be used for communicating in a very crippled and limited way. The typical reaction by an Esperantist to this point of view is to counter that the argument is theoretical, and that the fact that Esperanto can be and is used widely and successfully throughout the world today is sufficient to disprove the theory. Unfortunately, while this fact is true enough, it is difficult to demonstrate. It seems worthwhile, therefore, to look into the theoretical arguments regarding the artificiality of Esperanto and see just where they are in error.

The "natural language" theory is usually presented as follows: a language is the particular group of spoken and written symbols used to represent specific ideas by a particular group of persons. Every language is the product of some culture, therefore a language *not* based on some culture is not a true "language" at all.

Dr. Blair Hanson, Chairman of the Department of Modern Languages at Allegheny College, expressed the view in a recent article that the chief difficulty with the international language idea is that different language groups, having different cultural heritages,

different points of view and different natural circumstances would have difficulty in comprehending abstract concepts, and even concrete things which are alien to their own cultures. The point is well taken, except that it assumes that every cultural group in the world is completely isolated from every other group. As a matter of fact, cultural differences probably would have precluded the development of an international language two or three centuries ago. In recent years, however, the world has become a different kind of a place. The constant interchange of ideas due to rapid communications and quick transportation, as well as other factors, represents a powerful unifying force at work to reduce the differences between the world's cultures and accentuate their similarities. Moreover, the political and sociological experiences of the last 150 years have not been limited to individual and isolated cultural regions, but have affected large areas of the world simultaneously. The industrial and technological revolutions alone, probably the most important factors in shaping the societies of today's world, were experienced by almost all societies in common.

The drawing together of the world's cultures has had a marked effect on the world's languages. This is clearly seen by comparing the vocabularies of various modern languages. We expect to find similarities between French and Spanish, or be-

tween German and Dutch, since these languages belong to the same families; but how does one explain the large numbers of words common to *many* languages belonging to different families, except in terms of the common experiences which have been shared by each cultural group? Experts are almost unanimous today in predicting that our world will eventually synthesize all its languages and produce, through "natural" processes, a single tongue. Such a prediction could not be made except on the basis of evidence that this very synthetic process is already taking place.

The fact that a large body of linguistic material *and the related cultural factors* are common to a large part of the world society is what makes an international language theoretically possible. From 60% to 80% of the vocabulary of Esperanto is cognate with the vocabularies of the major Western languages. Since before 1900, new concepts and technological innovations producing new words in the "natural" languages have, by precisely the same sort of processes, produced new words in the "artificial" language, Esperanto.

Esperanto is artificial only to the extent that it was originally conceived by one man. Today it is a "natural" language, inasmuch as it functions in daily use for the purposes for which a language is used. Moreover, it is not limited to those spheres where the cultural experiences of the users are in common; for in the process of learning the language, and in the first stages of using it for practical purposes, the new Esperantist is confronted with the situations in which his own background is inadequate,

and he learns—from his instructor, or from the context, or by asking questions—what he did not know before. It should not be necessary to point out that expanded horizons are a natural by-product of a knowledge of Esperanto.

When Esperanto was originally published by its creator, Dr. L. L. Zamenhof, it consisted of 16 very general rules of grammar and a basic vocabulary of 904 word-roots. The latest edition of *PLENA VORTARO* (complete dictionary), published last year, has 7,866 word-roots.* In other words, 6,962 roots have entered the language since its publication. These words were not "created" by any one man or group of men, but were added to the language naturally, i.e., through general usage by the thousands of people who know Esperanto, and by the Esperanto press (which consists of some 50 regularly appearing periodicals). In the strictest sense, then, only 11% of the roots in Esperanto are "artificial," and the other 89% are "natural." On the other hand, even the 904 "artificial" roots were taken from natural languages and only changed to conform with Esperanto's structure, so that they, too, can hardly be called "artificial."

It is enlightening to consider why, out of more than 300 international language projects put forth in the last 100 years, *only Esperanto* has come into regular and practical use in all parts of the world. There are three basic reasons. First, Esperanto is based on what is common to all major Western languages, not just one language or language family. Second, Esperanto was designed to encourage

its *natural* development; since the first book was published in 1887, no "authority" of any kind has added to or changed a thing in the language.‡ New words or grammatical concepts are made official only *after* they have been in general use for some time. Third, the world-wide Esperanto movement, like the Red Cross, is traditionally neutral in matters of national or international politics. The movement is not allied to any nation or group of nations, nor to any religion, economic or social idea, or political movement. This is not to say that particular governmental, religious, or political groups do not *use* Esperanto for their own purposes; because Esperanto belongs to everyone, and can be used by anyone. The international Esperanto movement, however, represented by the Universal Esperanto Association and its affiliated national societies, is strictly neutral on all questions not pertaining directly to the field of international language.

To sum up briefly, Esperanto is based on the linguistic and cultural similarities found in the major language groups of today's shrinking world. Most of the words and much of the grammar are the product, not of one man's inventiveness, but of more than 60 years' practical use of the language by more than a million people of almost every nationality.

*These 7,866 roots, expressed in terms of numbers of actual words, represent a vocabulary of over 80,000.

‡The single exception to this statement involves a minor change in the spelling of several words. The modification appeared shortly after the first publication of the language and was actually more in the nature of a correction than a change.

Next Issue

Read detailed reports of the 40th—"Jubilee"—Universal Esperanto Congress at Bologna, Italy, July 30 through August 6, and the annual Convention of the Esperanto League for North America at San Diego, July 8—10.

Unuece al la venko!

Ni Esperantistoj nun havas plej bonan oportunon starigi la movadon sur firma bazo en Norda Ameriko. La decido de UNESKO, la streĉaj klopodoj al mondpaco farataj de la usona kaj ĉiuj aliaj registaroj, kaj la eblo ke la fera kurteno baldaŭ malaperos, tiel ebligante ke Esperanto estu vere universala lingvo, povos multe ŝanĝi la publikan sintenon favore al nia afero.

Ni scias labori. Ni scias batali. Ni laboru kaj batalu samideane por Esperanto.

Dum ĉi tiu jaro de la Jubilea Kongreso de la tutmonda movado ni, samideanoj ĉiuj, solene ĵuru fidelon al la verda stelo. Formala unuiĝo de du organizoj eble estos longa, penega afero. Ni laboru por tia unuiĝo. Sed plej grave estas, ke ĉiuj gesamideanoj kunlaboru amike, samideane, kaj per ĉiuj fortoj, por Esperanto. Tio, pli ol io ajn alia, helpos al estonta formala unuiĝo.

F.R. Carlson.

ESPERANTO AROUND THE WORLD

"Children of the World"

Many Esperantists have been receiving mail from a firm in Tokyo, Japan, that is publishing a set of books under this title. This is a most important and praiseworthy enterprise, promising great good to the world in general and to the cause of Esperanto in particular. The firm, Heibonsya, Ltd., is in the process of producing a set of fifteen books of letters, essays, drawings and photos by children between the ages of six and sixteen from all parts of the world. Such an enterprise will certainly wield a powerful influence toward international understanding, friendship, and fraternity.

The project is of particular interest to Esperantists, since the publishers are using Esperanto as a means of communication and contact with other countries. Heibonsya, publishers of encyclopedia and similar books, have already published an eight volume set of children's works by Japanese children. The next volume will be from England and Ireland. Among the later books will be one from North America.

Literature sent out by Heibonsya indicates they want articles, photos, and drawings, the articles to be just as the children write them. Contributions are to be written in Esperanto, English, French or German, or be translated into one of these languages.

The publishers report some difficulty in getting sufficient material from some countries. This appeal is worthy of hearty response, and the full cooperation of every Esperantist. It is to be hoped that we in North America will not let them down.

The required essays and drawings may be secured in various ways: by direct appeal to boys and girls, to Boy and Girl Scout leaders, and by turning the appeals over to the superintendents of local schools. The latter method is being used here in Hillsborough County, Florida, and promises of cooperation have been very cordial and encouraging.

A good system would be for one or more Esperantists in each community to receive, assemble, and forward all the contributions that may be secured.

For complete details write to the League Secretary, Conrad Fisher, Rt. 1, Meadville, Pa., or to the REVIEW, or directly to: *Infanoj de la Mondo, Heibonsya, No. 4, Yonbantyo, Tiyodaku, Tokyo, Japan.* These people are helping us; let us help them.

Geo. E. Wagner
Tampa, Florida

39th B.E.A. Congress

The 39th British Esperanto Congress took place Easter week-end at The Hayes Conference Centre, Swanwick, Derbyshire. In all, 160 persons took part, including one member from far-off Wellington, New Zealand.

Uruguay

Since the General Conference of UNESCO was held here last winter, this city is experiencing great public interest in Esperanto. Activities include regular radio programs, lecture series, and classes. Reports are that there are not enough instructors available to fill the demand for classes.

The Uruguayan government may be officially represented at the Jubilee Congress of Esperanto at Bologna.

Czechoslovakia

Although the Czech Esperanto movement has existed under serious government-imposed restrictions for

some years, a circular sent out by the Esperanto club in Prague indicates that Czech President Antonin Zapotocky is still personally favorable to Esperanto. It will be remembered that Pres. Zapotocky was one of the signers of the international petition favoring Esperanto.

"Internaciaj Esperanto-Kursoj"

Again this year *Internaciaj Esperanto-Kursoj* has organized courses for advanced students and for those wishing to become direct-method "Cseh-course" instructors. The courses will take place in Helsingor, July 17 to 24. Information is available from L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj, Denmark.

ESPERANTO IN NORTH AMERICA

San Diego

The San Diego Esperanto Society and the Esperanto Club of Los Angeles are planning to get together in August for a beach or mountain party. The exact date and location have not yet been picked, but the outing will be located so that it is approximately mid-way between the two cities.

Esperanto classes in the San Diego schools have received official approval of the State Board of Education and continue in full swing. Classes are held each Wednesday at San Diego High School.

The San Diego Public Library has allotted at least three display cases to the San Diego group for an Esperanto display beginning June 24 and continuing through the Congress dates (July 8-10).

Los Angeles

Mrs. Blanche Parker is the new Treasurer of the Esperanto Club of Los Angeles after the resignation of Dirk Brink. Mrs. Parker lived for several months in Cuernavaca, Mexico, before her return to Los Angeles recently. Her accounts of her personal experiences in Mexico and the Esperanto movement in that country were a highlight of a recent meeting of the club.

Louella Parsons reported in the *L. A. Examiner* that Warner Bros. are planning a film based on Hendrik W. van Loon's "The Story of Man-kind." She mentioned that this book has been translated into 17 languages, including Esperanto. (The Esperanto translator is L. A. Club member George Saville, who has the translations of at least four other major

books to his credit and is currently working on a translation of George Lemaitre's "Biography of Beaumarchais" and an original novel.)

Lew Ayres, the famous film star, is making a picture about the world's religions. In his research on the oriental Oomoto religion, which uses Esperanto in its publicity, he got in touch with Mr. and Mrs. Charles Chomette and Joseph Scherer who provided him with information about the International Language. Lew will run into Esperanto again, when he starts looking into the Baha'i faith, which encourages Esperanto among its followers.

"Esperanto Delegate" is a listing in the Los Angeles telephone directory. Requests for information about Esperanto are received regularly, including one from Carmel, 400 miles to the north!

San Francisco

The Esperanto Society of San Francisco has elected Harold Dreyer its new President after the death of Helene Wolff (see March-April REVIEW). Natasha Menshikoff is secretary. The first action of the Society under its new officers was to draft a letter honoring Miss Wolff which was sent to various Esperanto publications. On May 5 an open meeting was held, after considerable publicity in the local press, together with an exhibit in a store front on a busy shopping district street. From this meeting and exhibit, and from lectures given by Miss Menshikoff before social groups, a class of beginners was formed and reports excellent progress to date.

Seattle

The Seattle Esperanto Society announces its annual picnic will be held this year on July 17 at Woodland Park in Seattle. SES will furnish coffee and ice cream. Everyone is invited, according to Mrs. Duane Walter, President.

Washington

Washington Attorney William E. Baff appeared before the Senate Subcommittee on the Revision of the United Nations Charter and presented a document containing recommendations regarding the use of Esperanto by the U.N. Mr. Baff's remarks may be read in the printed record of the hearing.

Minneapolis

The University of Minnesota has opened a course in Esperanto. The class is instructed by Richard T. Vineski and is under the auspices of the World Government club at the school.

Quebec

The Sacred Heart College is another school which now offers a course in Esperanto.

Ursinus College, Pa.

Prof. Allen Rice, who teaches German at Ursinus College, Pa., reports that the Esperanto class at the College "graduated" 60 new Esperantists, including five faculty members who took the course. At least one of the former class members is now teaching Esperanto at a Pennsylvania high school.

(Continued on page 13)

LA GARDOSTARANTO

De D. B. Richardson

LA SARGVETURILO ruliĝis ade orienten tra la silenta mallumo. Kio plej impresis al Rikardo, dum li sidis rigide en la malantaŭo, sia pafilo inter la kruroj, estis la absoluta manko de lumo. Li sciis, ke antaŭe kaj poste pluraj aliaj veturiloj portas siajn homajn ŝarĝojn tra la nokto, sed li tute ne povis vidi ilin. Alte, preter la nuboj, povis esti ke la luno kaj la steloj provas lumigi la teron, sed sensukcese. Ŝajnis al Rikardo, ke li rajdas rekte en la faŭkon de inkubo; kaj li tre bone havis tiun impreson, ĉar Rikardo venadis al la milito.

Post kelkaj horoj la veturiloj haltis. Serĝento venis ĉirkaŭe al la malantaŭo kaj informis, ke oni alvenis. "Ne bruligu alumeton, aŭ parolu tre laŭte," li diris, "ĉar la malamiko troviĝas je distanco de kelkaj centoj da metroj en tiu direkto," kaj li gestis per la mano. Povante vidi nur la silueton de la serĝento, kaj tion nur malprecize en la ĉiea nigreco, Rikardo tamen turnis la kapon kaj provis penetri la mallumon en la indikita direkto. Strangaj, konfuzaj pensoj venis al lia menso. Ŝajnis strange, ke li ne aŭdas pafilojn, nek la sibladon de raketoj; kaj li ĉiam supozis, ke kie troviĝas milito, ebenaj kampoj etendas sin kun tie kaj tie izolaj stumpoj de arboj videblaj kontraŭ fono de ruĝa brilo; ĉi tiu nenieco estis la

lasta afero, kiun li atendis ĉe la fronto. Mirante, li surŝultrigis sian vestaĵosakon, ekprenis la pafilon ĉe ĝia mezo, kaj, kune kun siaj kamaradoj, sekvis la serĝenton al sia dormloko en evakuita farmkonstruaĵo.

En la fruaj horoj de la posta mateno, Rikardo konatiĝis kun siaj novaj oficiroj kaj suboficiroj, multaj el la aliaj novuloj kun kiuj li alvenis la antaŭan nokton, kaj pluraj el la soldatoj, kiuj jam delonge estis ĉe la fronto kun tiu regimento. Li lernis iom pri sia nova kompanio, pri la tiama situacio en la milito (kion oni nomis la "granda bildo" kaj la "malgranda bildo"; la granda bildo rilatis la tutan militon, dum la malgranda rilatis nur la tiean, lokan situacion). La malamiko troviĝas trans ne tre larĝa rivero. Li kuŝas en tranĉeoj kaj malofte montras sin. Nun estis komprenate, ke la milito baldaŭ estos finita, kaj ke la malamiko estas venkota, sed oni povas atendi sovaĝajn atakojn de lia flanko ankoraŭ. La militado en ĉi tiu sektoro konsistas nuntempe nur el dumtagaj observadoj kaj dumnoktaj patroloj. Preskaŭ ĉiun nokton iu el la kompanioj ricevas surprizan "viziton" de malgranda grupo de malamikoj kiuj ĝenerale forkuras kiam ili estas ekviditaj de niaj trupoj. Ankaŭ niaflanke tiaj patroloj eliris de tempo al tempo. Plej ofte la celo de tiuj pat-

roloj estis elserĉi kaj esplori la malam-
ikajn fortikaĵojn. Rikardo lernis la gra-
vecon de la pasvorto, kiun oni uzis en la
nokto, se oni iras for de la dormloko.
Ĉiam atentaj pro ebla enfiltriĝo de mal-
amikaj patroloj, gardostarantoj senhe-
zite pafas iun ajn homon se tiu ne rap-
ide respondas per la ĝusta vorto al ilia
postulo.

De tempo al tempo, tra la tago,
Rikardo aŭdis tre foran krakon de paf-
ilo aŭ la obtuzan sonon de artileria eks-
plodo ie en la foro. Sed la milito ne
venis pli proksime ol tio, kaj iom post
iom Rikardo permesis al si malstreĉiĝi.
Li skribis leteron al sia familio, legis
paperbinditan romanon donitan al li de
unu nova kamarado, kaj konstatis kun
ĝojo ke la manĝaĵoj tie ĉe la fronto
estas varmaj kaj neniel malbonaj. Tiel
pasis la unua tago, kaj je frua horo
li enlitiĝis en sia dormsako.

Sed la dormo ne venis tiel facile.
Dum longa tempo li kuŝis en la silento,
pensante pri multaj aferoj, sed ĉefe
pri unu afero; same kiel ĉiu viro, kiu
scias, ke li baldaŭ partoprenos en sia
unua batalo, Rikardo scivolis ĉu li
kapablos batali, aŭ ĉu li venkiĝos de
siaj timoj kaj mortos pro sia malkura-
ĝo aŭ pro nesperteco, aŭ plej malbone,
kondamniĝos de siaj propraj oficiroj
pro manko de kuraĝo. Kaj tiam prez-
entis sin al li la plej granda demando
el ĉiuj: *ĉu li kapablos mortigi homan
estaĵon?* Dum dek-naŭ jaroj la familio,
instruistoj, pastroj, la socio ĝenerale,
instruis al Rikardo, ke mortigo estas
malĝusta, ke ĝi estas peko, malper-
mesata de Dio mem. Nun oni donis al
li pafilon, kaj instruis al li, kiel ĝin uzi
kontraŭ viro. Rikardo estis iomete tro
juna ankoraŭ por tute konstati la mor-
alan problemon, kiun la situacio prez-
entis, sed lia spirito ne estis tro

supraĵa por permesi al li akcepti sian
devon sen iom da protestemo.

De tempo al tempo dum la nokto li
aŭdis la etajn bruojn de la kaporalo,
kiu vekas iun soldaton, al kiu estos la
vico gardostari. Unu fojon unu el la
soldatoj, kiu ne povis dormi, elpaŝis
por spiri iom da aero, kaj tuj venis la
postulo de la gardostaranto pri pas-
vorto. "Lulilo", diris la soldato. Rik-
ardo miris pri la elekto de tia vorto.
Li supozis, ke oni ĉiam uzas signifo-
plenajn vortojn, kiel "libereco" aŭ
"venko". Nur poste li lernis, ke oni
prefere uzas tiujn vortojn, kies pro-
noncon la malamiko malfacile imitas.
"Lulilo", Rikardo ripetis al si silente,
kaj lasis la vorton ŝvebadi en lia kon-
scio, ĝis finfine li endormiĝis.

Pro sia maltrankvila spirito li kom-
encis sonĝi. Sur vasta, ebena kampo,
almarŝis viro en stranga uniformo. Li
portis ne la ŝtalan kaskon de moderna
soldato, sed la ledan de futbalistoj kaj
aliaj atletoj. Lia pantalono estis ĉifon-
ita, malpura, kaj li trenis post si rid-
indan, kotoŝmiritan ludpafilon. Sur
la vizaĝo evidentis la profunda lacego
de ĉi tiu kompatinda militanto. Kiam
li alproksimiĝis al Rikardo, videbliĝis
insigno sur la kasko. Li estis la malam-
iko! Rikardo frontis al la soldato, rigar-
dis en ties vizaĝon konstatante tie la
lacon kaj senesperon de homo, kiu jam
vidis tro multe da milito. Rikardo mal-
rapide levis sian propran pafilon kaj
provis tiri la ĉanon, sed li ne povis. Li
volis forĵeti la pafilon kaj forkuri de la
loko. Li volis plori, sed li subite vidis,
ke la malamika soldato ŝanĝas sian
aspekton. Li rektiĝas, la ledo de lia
kasko fariĝas ŝtalo, kaj la vizaĝo per-
das sian simpatian mienon. Nun la
soldato aperis kiel fortika giganto, kiu
ridegas al Rikardo kaj minacas lin per

timige malbela paflego, ĉe kies antaŭo ekbrilis longa bajoneta klingo. Terurigite, Rikardo levis la propran pafilon kaj premis la ĉanon kvar, kvin, ses fojojn, celante rekte en la ventron de la ankoraŭ laŭte rideganta soldato.

Kiam la voĉo de la serĝento vekis lin, li grade konsciigis pri la movetoj de la aliaj soldatoj, kiuj surmetas siajn vestaĵojn, prepare por la matena enviciĝo. La suno ankoraŭ ne aperis, sed kelkaj grizaj strioj en la orienta ĉielparto lumigis la internon de la farmdomo sufiĉe por ebligi iom da vidado. Rikardo komencis vestigi sin, kaj jam forgesinte sian terurigan sonĝon, li scivolis kiaj estos la agadoj de la nova tago.

Post la kelkminuta enviciĝo kaj post varma matenmanĝo, Rikardo, ne ricevinte ankoraŭ iajn ordonojn, malstreĉigis denove sur sia dormsako, kie liaj pensoj vole-nevole reiris al la demandoj kiuj tiom maltrankviligis lin. Sed lia cerbumado estis interrompita per la enveno de la serĝento, kiu alvokis Rikardon kaj ordonis, ke li tuj prenu siajn aĵojn kaj akompanu lin al alia konstruaĵo, kie estas la ĉefejo por la gardostarantoj. Rikardo deĵoros tie dumtage, kaj en la nokto li revenos al sia dormloko kaj gardostaros nur dum parto de la nokto. Feliĉa, ke li nun havos ion por fari, Rikardo sekvis la serĝenton trans la farmeja korto. Post kelkaj minutoj li ricevis siajn ordonojn, lernis sian postenon kaj komencis la dumtagan deĵoron.

Vere la tago pasis tre rapide por Rikardo, kaj kiam la ombroj de krepusko plinigriĝis kaj fariĝis nokto, li gratulis sin, ke lia dua tago ĉe la milito estis kvieta kaj sukcesa. Li enrampis la dormsakon kaj sen granda peno li falis en trankvilan dormon.

Li havis malprecizan senton ke iu tuŝas lian ŝultron. Tiam li ekkomprenis, ke venis lia vico por la nokta gardostaro. Ankoraŭ ne tute vekiginta, li tiris sin el la dormsako kaj surmetis la vestaĵojn, ekprenis sian pafilon kaj eliris por anstataŭi la gardiston, kiu finis sian deĵortempon. Ĉi tiu salutis lin mallaŭte, informis, ke ĉio estas kvieta, kaj foriris kun lasta konsilo: "Se io movas, kaj ĝi ne scias la pasvorton, pafu."

Rikardo ĉirkaŭrigardis en la malmulta lumo de la nubhava ĉielo. Li povis vidi eble 50 metrojn. Branĉoj de arboj, apenaŭ distingeblaj en la distanco, movetis facile en la ioma vento. Kelkfoje Rikardo imagis, ke li vidas homan figuron en la arboj, kiam estis nur la movetantaj, duonvideblaj branĉoj. Li strebis penetri la ombrojn, ĝis liaj okuloj komencis dolori kaj li devis forturni la rigardon dum momento. La tempo pasis malrapide, kaj li konstatis ke la longtempa deĵorado apenaŭ komenciĝis. Li ne povos tiel rigide kaj malstreĉe posteni, aŭ li fariĝos nervomalsana antaŭ la fino de la deĵortempo. Iom post iom li sukcesis malstreĉi sin kaj eĉ permesis al sia menso iom vagi al diversaj temoj—li pensis pri sia familio, pri knabinoj, kiujn li konis, pri diversaj okazoj dum sia milita prepariĝo.

Subite li lasis siajn revojn. Ŝajnis, ke li vidas ion moviĝi inter la arboj. Ĉu viro? aŭ ĉu nura branĉo puŝata de la vento? Streĉante ĉiujn fortojn, li rigardis al la loko, sed nenion vidis plu. Tamen aŭdigis mallaŭta sono, kiu povis esti nenio ajn, sed kiu sonis preskaŭ metale, kiel ekzemple pafilo frapanta kontraŭ butono aŭ buko. Unu aŭ du longajn minutojn Rikardo rigardis kaj aŭskultis, apenaŭ spirante. Kiam li

aŭdis denove iun brueton, kiun li ne povis klarigi kiel natura, li silente mal-suprenigis sin en la apuda fostruo por atendi. Strange, ke li nun ne dubis pri sia kapablo batali se li devos fari tion, eĉ ne pensis pri tio. Nun li fariĝis la batalopreta soldato, kiu li devis fariĝi post la monatoj de instruigo kaj prepariĝo. Kaj tiam la luno trovis truon en la nuboj, kaj verŝis palan lumon sur la lokon. Tie kaŭris sola malamika soldato, tenante iun objekton—Rikardo tuj divenis, ke ĝi estas kompas—kaj duonturnante sin en unu kaj alia direktoj, provante sin orienti. Rikardo metis la pafilon al la ŝultro, zorge celis, sed ne pafis. Subite li ekkonstatis, ke jen li havas homan vivon antaŭ sia celilo. Dum mallonga momento Rikardo la soldato cedis al Rikardo la homo; li havis impulson pafi en la aeron por fortimigi la malamikan soldaton; ŝvito, aperinta sur lia frunto, gutis en la okulojn, kaj lia gorgo komencis dolori pro sekeco. Li tremis, kaj lia ŝultro frotetis la flankon de la fostruo, forpuŝante malgrandan ŝtonon. Ĝi brueto falante al la malsupro de la truo. Fulmrapide la malamika soldato ĵetis sin sur la teron, tenis la pafilon pafopreta, kaj serĉe rigardis en la direkto al la bruo. Post sekundo li ekvidis la kapon de Rikardo, kaj ŝvingis la pafilon por celi. Rikardo, la propra pafilo celita ankoraŭ al la alia viro, sentis la sangon kuregi tra la vejnoj, batante kontraŭ la tempioj. Li volis elkrii, ne pro timo, sed pro abomeno. Li sciis, ke post momento li devos vomi. Tiam, antaŭ sia celilo, li vidis la tubon de la malamika pafilo, kaj li ne plu hezitis, sed tiris la ĉanon. . . . En tiu momento la milito prenis du viktimojn: la malamiko, kiu kuŝis morta en la nokto, kaj Rikardo, kiu neniam povos forgesi.

DU MARISTAJ KANTOJ


I

Blovu, blovu vento, pluvu plue pluv',
 Veli kiel Noa velis post diluv',
 Veni kiel Noa al Mont-Ararat',
 Fali de sur ŝipo, droni kvazaŭ rat'.
 Hej maristo, hoj maristo,
 Malfacilas mar-ekzisto,
 Vivo dura, viv' en tristo,
 Oj! maristo Hansen!
 Hirte hurlo hajlo, brulu brile sun',
 Ni kuraĝe krozas regnon de Neptun',
 Poste venas hejmen, hejmen al edzin',
 Trovas ŝin en tombo, trovas morta ŝin.
 Hej maristo, hoj maristo,
 Malfacilas mar-ekzisto,
 Vivo dura, viv' en tristo,
 Oj! maristo Hansen

II

Ĉe Strato de l' Foko mi trovis knabinon,
 Mi trovis knabinon ĉe Strato de l' Fok',
 Kaj min ŝi brakumis kaj premis
 sur sinon,
 Kaj tiel la fiŝon trapikis la hok',
 Ej-la! fiŝo kaptita,
 Ej-la! turniĝu kapstan'!
 Virin' estas bela, virin' estas spita,
 Maristo edziĝas laŭ vol' de Satan'!
 Ĉe Strato de l' Vento mi trovis tavernon,
 Mi trovis tavernon ĉe Strato de l' Vent',
 Mi verŝis cisternon en mian internon—
 Por kio krom tio valoras arĝent' ?
 Ej-la! drinku abunde,
 Ej-la! turniĝu kapstan'!
 Ja drinku dimanĉe, soifos vi lunde,
 Kaj rumon ne donos al vi kapitan'.
 Ĉe Strato de l' Jaro mi trovis postenon,
 Mi trovis postenon ĉe Strato de l' Jar',
 Post unu monato mi nuptis sirenon—
 Tre baldaŭ denove mi velis sur mar'.
 Ej-la! kara sireno!
 Ej-la! turniĝu kapstan'!
 Sur maro mi havas malpli da ĉagreno,
 Tro pika la lango, tro peza la man'.
 El *Esperanto en Skotlando* W. AULD

Novaj Libroj



(Libroj recenzitaj en la REVIEW estas mendeblaj, krom la Jarlibroj de UEA, ĉe *Esperanto League Book Service*, Middleton, Wis.)

La Fundamenta Krestomatio, de L. L. Zamenhof, reeldonita de THE ESPERANTO PUBLISHING CO.

En 1946 S-ro William Bailey, ano de la Lingva Komitato, komencis la grandan laboron revizii ĉi tiun bone konatan verkon, kun la ideo ke la stilo de la hodiaŭa Esperantistaro ŝanĝiĝis de tiuj fruaj tagoj, kiam D-ro Zamenhof kompilis la *Krestomation*, kaj ke multo en ĝi nun estas arkaikiginta. Kiam S-ro Bailey mortis antaŭ ol li povis fini la laboron, akademiano W. J. Downes akceptis la taskon kompletigi la revizion.

Tion li faris tre bone. Oni ne pensu, ke per "revizio" de la "fundamenta" verko de nia lingvo ni ion perdas de la konstantiga karaktero de la originalo; nenie oni ŝanĝis la tekstojn mem, sed aldonis en piednotoj la plibonigojn, kiujn postulas la nuntempa stilo. La plej multaj piednotoj simple indikas preferatan vorton aŭ formon, sen klarigi kialon por la ŝanĝo, ĉar la kialo estas tuj konstatebla de spertaj Esperantistoj. En iuj lokoj oni trovas pli

detalajn notojn pri lingvaj punktoj, ankaŭ klarigojn pri la tekstoj mem, por informi la leganton pri historiaj faktoj, k. c.

Kompreneble la "revizia" procedo estis almenaŭ parte subjektiva, kaj oni povus disputi kelkajn punktojn; sed granda parto de la reviziado baziĝis sur pli postaj skribaĵoj de D-ro Zamenhof mem kaj, efektive, ne temas tiom pri "ŝanĝoj" en la lingvo kiom pri simpla evolua procedo. Ni ne povas postuli, ke nia lingvo restu ĝuste sama hodiaŭ, kiel ĝi estis antaŭ 50 jaroj, kaj samtempe pretendi al la mondo, ke nia estas "vivanta" lingvo.

La Fundamenta Krestomatio estas rekomendinda precipe al novaj Esperantistoj, ne nur por ke ili lernu sekvidan Esperantan stilon, sed ankaŭ ĉar la libro enhavas la klasikan literaturon de nia lingvo. Mi mem reiras al neniu alia literatura libro en mia Esperanta libraro tiel ofte, kiel al la *Krestomatio*. Ĝiaj 140 paĝoj de poeziaĵoj, ekz., estas modelaj kaj plaĉaj. Kiu ne posedas la *Krestomation* malhavas unu el la plej elstaraj ĝuoj, kiujn alportas la scio de Esperanto.

D. B. R.

Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio, 1955. Unua Parto. 310 paĝoj,

bonaj papero, bindo, preso.

Plej bedaŭrinde estas, ke en Usono estas listigitaj delegitoj en nur 36 urboj, kvankam estas agemaj samideanoj en multaj aliaj lokoj pretaj plenumi la devojn delegitajn, sed sen rajtigo fari tion.

(Continued from page 7)
Esperanto in North America

Esperanto in the Press

An article on Esperanto activities in New Jersey, together with a picture of Elsie Younghans, one of the founders of the Esperanto Association of New Jersey, appeared in the Hudson County section of the New York Sunday News on March 27.

Synchroscope, the monthly publication of the Edison Co., devoted half a page in its March issue to Detroit Esperantist Ed Sievers.

North American newspapers which printed "letters-to-the-editor" on the subject of the International Language recently include the *Provincetown Advocate* and the *Wisconsin State Journal*.



Vokas Bolonjo

Adreso: 40-a Universala Kongreso de Esperanto, ĉe CIT, Piazza Nettuno 2, Bologna, Italujo.

Limdato: Post la 30-a de junio la L.K.K. ne plu akceptos aliĝojn al la Jubilea Kongreso. Post la 7-a de junio la Loĝiga Servo ne povas plu akcepti mendojn pri

hoteloj.

Fervoja rabato: Ni bedaŭras anonci, ke la speciala fervoja rabato antaŭe promesita ne estis donita por la U. K. La kutima rabato por grupoj tamen validas sur la italaj fervojoj.

Prospektoj: La sperto montris, ke la sendo de turismaj prospektoj povas havi malagrablajn sekvojn pro doganaj formalajtoj. La L.K.K. tial informas, ke ĝi ne povas akcepti respondecon pri pakajtoj senditaj, krom se la sendintoj jam antaŭe interkonsentis pagi ĉiujn eventualajn elspezojn ligitajn kun dogano.

Deĵoroj dum la kongreso: Iafoje en kongreso kongresanoj bonvolis sin proponi por helpo ĉe la deĵoroj. La L.K.K. en Bolonjo estos tre dankaj pro tiaj proponoj ankaŭ en la nuna kongreso. Tiajn proponojn bonvolu direkti al la kongresa oficejo. Notu bone, ke temas NUR pri kongresanoj.

Ŝvebantaj pagoj: La kongreso ricevis kelkajn pagojn de la banko sen ajna indiko pri la sendinto. Ni tute ne scias kiel uzi tiajn pagojn. Se vi sendas aŭ sendis pagon kaj nenion ricevis de la kongreso, bonvolu informi la L.K.K. kiel eble plej urĝe.

Statistiko (ĝis fino de aprilo): Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 27, Belgujo 16, Brazilo 3, Britujo 87, Cipro 1, Danujo 39, Egiptujo 1, Finnulo 50, Francujo 267, Germanujo 130, Hispanujo 5, Indonezio 1, Irlando 3, Italujo 285, Izraelo 2, Japanujo 1, Jugoslavio 68, Kubo 1, Maroko 52, Nederlando 148, Norvegujo 32, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Sudafriko 1, Svedujo 150, Svislando 33, Urugvajo 2, Usono 13. Sumo el 31 landoj 1399. Nemembroj de UEA 26.5%; instruistoj 18.5%; gejunuloj 7%.

MASON STUTTARD, K.K.S.

THE "X" VERB IN ESPERANTO

by

R. C. Marble

Ĉi artikolo memore
dediĉigas al
WILLIAM GEORGE ADAMS,
amiko, mentoro, serĉulo.
Dormu li pace!

"When sun is set the
little stars will shine."
—Robt. Southwell
(1561-1595)

To begin with, for sweet clarity's sake and to set the reader's curiosity at rest, a definition of an "x" verb in Esperanto would seem helpful. An Esperanto "x" verb is one whose entry is followed by a small, parenthetical "x" in the *PLENA VORTARO DE ESPERANTO* (Complete Esperanto Dictionary). The fourth edition of this indispensable reference work explains it under *Mallongigoj* (Abbreviations), on page 14, as "x tr. k ntr." To expand a bit pedantically this somewhat cryptic series of abbreviations one might write, "x marks an Esperanto verb whose root, or basic idea, requires no modification to express both the transitive and intransitive verbal forces." A verb in itself both transitive and intransitive is no stranger to the language of Shakespeare (cf. "boil," "shake," and many others), but it may come as something of a surprise to some to learn that the Esperanto verb shares, to a certain extent, this duality of function with several national languages.

While learning Esperanto some years ago, the writer fell victim to the then common misconception that all verbs in Esperanto were either transitive or intransitive. It is in the belief that some Esperantists may still be burdened by this crippling view, and the desire to relieve them thereof, that this by no means definitive treatment of the subject is undertaken.

Although slighted in most Esperanto grammars, one of the chief mnemonic efforts necessary in achieving a satisfactory command of Esperanto, it may be agreed, is the

requirement that the student memorize with each new verb learned its conceptual classification, i. e., whether it conveys as a root, or stem, a transitive or an intransitive idea. For example, when the student commits to memory the German-derived verb *juki*, "to itch," he must also learn that, contrary to English usage, *juki* is basically transitive. Therefore, he cannot *correctly* translate, for instance, "her arm itches" by *ŝia brako jukas*, but he may employ one of several grammatical expedients offered by flexible Esperanto. He may reach the desired translational equivalent by the use of the "intransitivizing" suffix *-iĝ-* (*ŝia brako jukiĝas*), or yet another method is made available by utilization of the reflexive pronoun of the third person, *sin* (*ŝia brako sin jukas*). The student encounters an opposite situation in translations involving the basically intransitive verb *boli*, "to boil," e. g., in a sentence for translation such as "the water boils" there is no hesitation in providing a literal rendition, *la akvo bolas*; but to translate "he boils the water" necessitates the use of the "transitivizing" suffix *-ig-*, perhaps in this way, *li boligas la akvon*, or, *li igas la akvon boli*. Yet with an "x" verb taken at random the student finds no similar grammatical decision necessary. In a sentence such as "I am whistling" he meets no translational difficulty in its Esperanto equivalent, *mi fajfas*, making use of *fajfi*, an "x" verb; nor does the transitive sentence "I whistled a tune" pose a problem as the knowledgeable student quickly, and without

modification of the verb, writes *mi fajfis arion* to provide a grammatically satisfactory Esperanto translation of the English. From the foregoing, a discerning reader could conclude that, compared to the learning of national language verbal systems with their countless irregularities and seemingly endless paradigms, the additional "x" verb burden (of somewhat less than a hundred verbs) on the Esperanto student's memory is, indeed, relatively light.

That Dr. Zamenhoff, the inspired author of Esperanto, made use of "x" verbs is evidenced by the following, non-exhaustive quotations from the *PLENA VORTARO DE ESPERANTO*.

Konscii

"*konscii sian fortecon*" - "la malsanulo ne plu *konscias*"

Radii

"en la varmaj landoj la suno *radias*

alian varmegon ol ĉe ni" - "li *radiis* de feliĉo"

Suferi

"*suferi* de la suno" - "ni ambaŭ *suferis* la saman malsanon"

There are many other examples of Dr. Zamenhoff's approval-by-usage of the Esperanto "x" verbs. The writer came across more than a dozen in a casual leafing through of the dictionary mentioned before.

As a student aid, and perhaps even of value to the experienced Esperantist, there is alphabetized below an attempt to complete a list of Esperanto "x" verbs. Verbs regarded as "official" begin with a capital letter; those verbs considered "unofficial," of which there are but eight, are readily recognized by their lower case, or small, initial letter. Additions or corrections to the following list would be welcomed by the author at P. O. Box 2081, VAN NUYS, California.

ESPERANTO "X" VERBS

- | | | |
|---------------|----------------|--------------|
| 1. Aklami | 32. Honti | 64. Opozicii |
| 2. Aludi | 33. Imponi | 65. Pardonu |
| 3. Ambicii | 34. Indulgi | 66. Paroli |
| 4. Anticipi | 35. Influi | 67. Penetri |
| 5. Apelacii | 36. Informi | 68. Pensi |
| 6. Aplaudi | 37. Insidi | 69. Pentu |
| 7. Aspiri | 38. Instrui | 70. Perfidi |
| 8. Atenti | 39. koiti | 71. persvadi |
| 9. Atingi | 40. Koleri | 72. Peti |
| 10. Babili | 41. Komandi | 73. Pretendi |
| 11. Baloti | 42. Kompati | 74. Prezidi |
| 12. Blasfemi | 43. Kondolenci | 75. Profiti |
| 13. Brokanti | 44. Konfidi | 76. Radii |
| 14. ĉantaĝi | 45. Konkuri | 77. Rajdi |
| 15. Danki | 46. Konkurenci | 78. Raporti |
| 16. Disponi | 47. Konkursi | 79. Reklami |
| 17. Dubi | 48. Konscii | 80. repliki |
| 18. Envii | 49. Konsenti | 81. Respondu |
| 19. eskapi | 50. Kontrakti | 82. Revi |
| 20. Esperi | 51. Kontrasti | 83. Rezigni |
| 21. Fajfi | 52. Kontribui | 84. Rigardi |
| 22. Fanfaroni | 53. Kredi | 85. Servi |
| 23. Fidi | 54. Loĝi | 86. Soifi |
| 24. Flati | 55. Ludi | 87. Sopiri |
| 25. Flustri | 56. Mastrumi | 88. Suferi |
| 26. Forgeŝi | 57. Memori | 89. temperi |
| 27. fuĝi | 58. Mensogi | 90. Valori |
| 28. gapi | 59. Minaci | 91. Venki |
| 29. Garantii | 60. Miri | 92. Vetu |
| 30. Ĝeni | 61. Naŭzi | 93. Vomi |
| 31. Helpi | 62. Obei | 94. Zorgi |
| | 63. Odori | |

EXECUTIVE BOARD DECISIONS

1. Approved the ballot for the 1955 election.

2. Any organization sending a minimum of 5 subscriptions to the REVIEW in one year may purchase such subscriptions at \$1.50.

3. That we welcome the proposal to establish a sister organization in Canada, and authorize the editor of the REVIEW to offer special favorable rates to such an organization for subscriptions to the REVIEW and for space in the REVIEW for purposes of their organization.

4. Instructed the Secretary to furnish a copy of the ELNA constitution as amended at the 1954 Congress to every member.

1955 ELNA CONVENTION

The Local Congress Committee announces that applications for Congress membership will be accepted until the start of the Congress, July 8. For application blanks write to: *Esperanto Society of San Diego, P. O. Box 4367, San Diego 4, Calif.*

Attention stamp-collectors: "First-day covers" will be mailed from the Congress. Send 10c for yours to the Esperanto Society of San Diego before July 4.

See the Congress program, now officially approved, in the March-April REVIEW.

NABEB

J. Henry Kruse, Jr., a director of the International League of Blind Esperantists, is the General Secretary of a new organization, the North American Braille Esperanto Brotherhood.

ANONCOJ

Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta rabato por du- aŭ plifloja apero. Petu informon pri tarifo por pli grandaj aŭ multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.

ESPERANTO READING MATTER

Group a) 20 different pamphlets for \$1
Group b) 10 " " " \$1
Group d) 5 " " " \$1
Group c) 7 " " " \$1

(my choice)

Esperanto-by-Mail
123 East 35th St.
Brooklyn 3, N. Y.

Pri Anonimaj Leteroj

Celante malhelpon al nia Ligo, sed efektive plej malhelpo al la tuta Esperanto-movado, lastatempe dissendiĝis anonimaj (kaj iuj subskribitaj) akuzoj kontraŭ iuj fervoraj samideanoj. Publikaj akuzoj, kontraŭ-akuzoj, kaj defendoj efikas nur por krei publikan malfidon al la tuta movado.

Ne dezirante helpi al tia sabotaĝado, la REVUO ne presas ion ajn pri la afero. Sed tiuj, kiuj deziras la faktojn, turnu sin al: S-ano F. R. Carlson, 2116 N. 35th St., Seattle 3, Wash., por privata respondo.

HEROLDO DE ESPERANTO

Nordamerika peranto:


Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

TEXT BOOKS, DICTIONARIES, READERS

The Esperanto Teacher	\$.45
Esperanto for Beginners10
Nelson's Esperanto Course	1.50
Step by Step in Esperanto.....	1.50
The Edinburgh Pocket Dictionary.....	.85
Fulcher and Long English-Esperanto Dictionary.....	2.35
Millidge Esperanto-English Dictionary.....	2.50
Johano kaj Silvio.....	.30
Junaj Detektivoj35
Gaja Leganto per Esperanto.....	.30

Write for complete Book-List:
 Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.

let's go to the congress!



APPLICATION BLANK

I enclose \$_____ for: (check)

Regular member	\$ 3.00
Supporting member	5.00
Patron	10.00
Life member	50.00
Man and wife.....	4.00
Subscription only	1.75

Name

Address

City

Print your name and address clearly. Send to: Esperanto League for North America, Meadville, Pa. Advise the League promptly if you change your address.